

# ★ *Ora Ĵurnalo*

Numero 2, decembro 2017

*Al la tuta mondo:  
Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*



Kristfesta etoso ĉe Kronhuset en Gotenburgo

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:  
[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)*



## Kio okazis post la unua numero de Ora Ĵurnalo?

1. Ni – Ingegerd, Andreas kaj Siv – ricevis laŭdon de diversaj personoj pri la iniciato eldoni retan Ĵurnalon.
2. Kelkaj legis tre atente kaj trovis erarojn... Laŭdon al ili !

a. "Ĝi ne estas ĵurnalo, sed monata revuo." Sed ne gravas! Oni ja povas legi po pecon el la paĝoj ĉiun tagon. La franca vorto *jour* (en Ĵurnalo) ja signifas tagon.

b. Bengt Olof Åradsson solvis la problemon sur paĝo 6 pri la foto de la nekonata kongreso. La kongreso okazis en Frostavallen, Skanio.

c. Ĉiam atentema Aino Åberg rimarkigis ke la ora trezoro sur paĝo 7 ne povas pezi 7084 kilogramojn, sed 7,084 kilogramojn.

### Daŭrigo pri Oraj trezoroj

En novembro 2013 la arkeologoj publikigis la trovon de la trezoro kun 29 oraj figuroj en Västra Vång en Blekinge. Antaŭ nelonge du pliaj figuroj estis trovitaj.

La oraj figuroj estas malgrandaj, maldikaj kaj kun orumitaj figuroj.



La arkeologoj pensas ke la oruloj estas trovitaj sur loko de kulturo aŭ templo.

Kio okazis en tiu ejo loko dum la tempo de vikingoj?

Skribu vian historion al la naskiĝfestoj ĉe Helfrid la 16an de Decembro! /Ingegerd

### Aliaj oruloj serĉataj

Mi, Siv, – vole-nevole – troviĝas en la elekta komitato de SEF (Sveda Esperanto-Federacio). Nun mi serĉas tri orbulojn :



1. prezidanto
2. kasisto
3. anstatuanto

Vi ankaŭ povas kandidatiĝi mem! Certe estas pluraj esperantistoj, kiuj ne apartenas al iu klubo kaj ne estas konataj de la majoritato. Unue serĉu kasiston, ĉar sen tiu, SEF ne povas funkcii. Do, sendu al mi proponojn pri la tri orbuloj: [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas reta magazino eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estos neregula, sed proksimume ĉiun aŭ ĉiun duan monaton.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

La magazino estas senkosta kaj elŝutebla el la retejo de Esperanto-Societo de Gotenburgo: [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org). **Volonte plusendi ĝin!**

**Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti  
la bibliotekon en Stannum, ili malfermos al vi!**

## Iomete pri la iama ICA-nutraĵvendejo en Stannum, kie nun troviĝas la esperantobiblioteko



*Kjell Jonsson kune kun sia edzino Kicki posedas la domon.*

Kjell rakontas:

La domo konstruiĝis en 1947 de Olle kaj Stina Eriksson. Tiam la negocado startis kiel ICA-vendejo.

En 1962 Inga-Stina kaj Karl-Erik Jonsson transprenis la negocon kaj daŭrigis la nutraĵvendadon ĝis la mezo de la deka jardeko. En ĝia lasta jaro ĝi fariĝis servobutiko, antaŭ ol la entrepreno ĉesis.

Miaj gepatroj venis el farmista familio. Mia patro havis laboron en Bergum, sed estis i.a. ankaŭ okupita pri laboro ĉe la muelilo de Stannum (ĝi ne plu troviĝas, mi pensas ke ĝi estis forbrulita). Mia patrino elkreskis en Ytterstad. Ŝi laboris pri viandaĵoj, antaŭ ol la paro transprenis la vendejon en Stannum.



*Karl-Erik havas telefonkontakton kun iu kliento. Kjell ofte akompanis sian patron, kiam li liveris varojn.*

La vivkondiĉoj de miaj gepatroj estis tiel malsimilaj ol tiuj de nia tempo, ke estas malfacile kompreni. En la flanko de mia patro, parencoj (mi ne scias kiom da) migris al Usono, por trovi pli bonan estontecon.

Miaj gepatroj naskiĝis dum la depresio kaj havis siajn infanecojn dum la dua mondmilito. Foje ili rakontis ke oni miksis arbŝelon en la panopaston, oni divenas ke de tempo al tempo estis malluksaj kondiĉoj. La gepatroj opinias ke ili havas memorojn de la nigrumo, kiam neniu fenestroj devus brili, kiel sekuriga dispono kontraŭ eventualaj atakoj de bombaviadiloj. Kiam mi ordigis en la domo post la forpaso de miaj gepatroj, mi trovis malnovajn porciokuponojn.



*Ĉe la kaso.*

Kiam miaj gepatroj komencis pri la ICA-vendejo, estis nova kaj streĉa ĉapitro de la vivo. Foje patrino rakontis ke ŝi memoras la onidiron ke venus aparaton, per kiu oni povus vidi kiam oni ludas futbalon. Estis antaŭ la televida epoko. Ili spertis grandajn ŝanĝojn je sociaj kondiĉoj.

Kicki venas de Nässjö, Smolando, kaj translokiĝis al Stannum en 1989. Mi (Kjell) estis kreskinta en la etaĝo super la vendejo, kiu do estas mia gepatra hejmo. Ni loĝiĝis en Gråbo en 1990. Ni transprenis la domon post miaj gepatroj, kiuj forpasis en 2011 kaj 2013 respektive. Kicki laboras en Vasaskolan,

Gotenburgo, kaj mi pri la sociala administrado de Angered.



*Ĉe la viandotablo.*

Memoro de mia infaneco estas la interrompoj de la kurento. Verŝajne la interrompoj pli oftis tiam, ĉar okazis plurfoje. Ĉiuokaze mi memoras ke la vendejpersonaro havis poŝlampetojn kaj dismetis kandelojn en la butikoj. Fariĝis tre silente en la butikoj, kiam neniu kasapartoj sonis kaj neniu frostigujoj zumis. Ankaŭ la ventoliloj haltis. Ĉio silentiĝis. Moĵose kaj samtempe ekscite. Sed la vendaĵo daŭris kiel kutime. Ĉe la kaso oni kalkulis mane aŭ per mana kalkulilo. Tio ankaŭ funkciis.



*Inga-Stina kun sia nepo Tobias, la filo de Kjell kaj Kicki.*

En la okdekaj jaroj estis maltrankvile en la labormerkato. Fariĝis granda striko kaj la liveraĵoj estis malregulaj. Mi memoras ke ĉiu

kliento nur estis permesita aĉeti limitajn litrojn da lakto.

lamaniere la vendejo de miaj gepatroj vere estis antaŭ sia tempo. Multfoje mi veturis vendrede kun mia patro por liveri varojn. Tiutempe la klientoj telefonis siajn mendojn al la vendejo. La varojn oni kolektis kaj (plej ofte) estis patro, kiu liveris ilin. Por tiu servo la kliento pagis 3 kronojn.

Hodiaŭ ĉi tio tute ne estas stranga. Mendoj per Interreto estas ĉiutaga afero.



*Jen bildo de 31a de decembro 1992. Floroj, kiam la vendejo de Inga-Stina kaj Karl-Erik ĉesis.*

La laborhoroj postulataj, por igi la vendejon profitodona, ne estus akceptitaj hodiaŭ. Divenprove ordinara laborsemajno tiam ampleksis 55–60 horojn.

Tempoj ŝanĝis. Miaj gepatroj fariĝis pensiuloj. Estis malfacile havi la konkurencon de grandaj vendejoj.

Nuntempe la vendejlokoj estas uzataj por enmagazenigo. Entreprenoj kaj privatpersonoj povas lui ekstran stokejon kiam bezono ekas. Stokejoj en diversaj grandecoj estas luigataj. Kaj feliĉe la Esperantobiblioteko troviĝas en la kelo. Baldaŭ ni metos esperanto-ŝildon ekster la domo.



## Vendejoj en Stannum

*Nuntempe estas multe pli da enloĝantoj en Gråbo ol dum la 20a jarcento. Tamen estas hodiaŭ nur du nutraĵvendejoj en Gråbo kaj neniuj en Stannum. Foje estis kvar en Gråbo. La grandmagazenoj de Gotenburgo "prenis" la klientojn.*

Sjöblom startis sian unuan nutraĵvendejon en la dometo de Svante Andersson, "Svantes". Poste li konstruis la unuan permanentan vendejon en la vilaĝeto de Stannum, ĉirkaŭ 1906. Ĝi ankaŭ funkciis kiel poŝtcentralo.

Dum la jaroj 1925 – 1926 li ankaŭ havis filion apud la haltejo de Ytterstad ĉe la landlimo de Gotenburgo.

Du vendejojn ni ricevis en Stannum, kiam Manne Wallin konstruis kaj estris nutraĵvendejon ĉe la fervoja stacidomo de Stannum ĉirkaŭ 1921.

Ivar Edvardsson startis biciklan vendejon kaj riparejon en sia hejmo proksime al la stacidomo komence de la 30a jardeko.

En la vendejo ĉe la stacidomo gotenburgano komencis ŝuriparejon, verŝajne dum 1925 – 1927. Pli poste tiu domo estis luita de la baptistoj kiuj uzis ĝin kiel predikejon.

La viandovendejo de Börjesson komenciĝis en la jaro 1946 distancete de la stacidomo laŭ la vojo al Olstorp. Fine de la 50a jardeko Nyrén transformis ĝin al nutraĵvendejo. Tie la Stannumanoj ankaŭ povis lui frostiguojn. Ankoraŭ ne estis normo havi frostiguojn hejme.

Plue ni havis la kioskon de Sigrun, proksime al la stacidomo 1953 – 1969.

Dum la someraj monatoj troviĝis bakejo en la kelo de Sigrun 1950 – 1958

Se ni tempe reiru ni trovas la unuan bakejon de Stannum meze de la 20a jardeko. Anna

Aspling komencis baki en lavejo, kie troviĝis fera forno ĉar ni uzis ĝin kiel someran kuirejon. Poste ŝi konstruis domon tre proksime kaj daŭrigis la bakejon tie. Ŝi vendis al plural vendejoj inter Gotenburgo kaj Sjövik.

Samtempe ŝi havis etan pensionan entreprenon dum pluraj jaroj.



*"Gustafssons affär", ankoraŭ unu el la nutraĵvendejoj en Stannum. (La aŭto estas en la malĝusta ŝoseo!)*

Koncerne "Sjöbloms": la vendejo estis transprenita de la bofilo Olle Eriksson kaj la filino Stina en 1936, la saman jaron kiam ili geedziĝis .

En 1947 Olle kaj Stina konstruis sian novan vendejon ĉe la ŝoseo, kaj gvidis ĝin ĝis 1962, kiam Inga-Stina kaj Karl-Erik Jonsson aĉetis ĝin. Ili gvidis ĝin ĝis Novjarvespero 1992.

La vendejo estis luigita dufoje al interesitoj, sed verŝajne ne eblis daŭrigi.

Tio estis la la fino de epoko por la vendejoj en Stannum, negoco, kiu dum la 50a jardeko ampleksis du nutraĵvendejoj, viandejo, kiosko kaj somera bakejo.

**Sed neniam antaŭe estis esperanta biblioteko en Stannum. Mankas al ni ŝildo, kiu montras al la biblioteko. Karaj legantoj – ĉu vi volus sendi al mi proponojn kiel aspektus la ŝildo. Mi antaŭdankas!**  
**[siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)**

## Pliaj entreprenoj en Stannum

Dum 10 jaroj la "Vendreda-revuo" eldoniĝis en Gråbo. Jen pri la muelilo de Stannum, konstruita en 1943. (La bildoj estas de fotokopiitaj paperoj.)

Fredags-Bladet:

**Årgång 11**

Fredagen den 29 oktober.

**Nr 40/1965**

### STANNUMS KVARN OCH SÅG

ägs av herr Bertil Andersson och ligger vid vägen Gråbo-Göteborg.

År 1943 byggdes kvarnen och har genom åren byggts till och moderniserats i takt med utvecklingen inom jordbruket. 1959 skaffades en säcktork med en kapacitet av ca 60 säckar per dygn.

Kvarnen i Stannum betjänar över 80 % av jordbrukarna i Lärjedalen, från Lärjeholm och upp till Sjövik.



Kjell-Åke Karlsson skyfflar säd i den nya torkens intag. Kvarnägaren Bertil Andersson berättar att den torkade säden lastas med hjälp av röret mitt på bilden.


Apud la muelilo ankaŭ troviĝis segejo.



Du kudristoj havis laboron en Stannum komence de la 20a jarcento (=1900-talet).

La foto estas farita ĉirkaŭ 1910.

## Proksime al nia biblioteko troviĝis la fervoja stacidomo de Stannum



La Vastra Gotia-fervojo konstruiĝis en 1900 inter Gotenburgo kaj Vara. La lasta trajno iris en la jaro 1967. Estis kun vaporlokomotivo.

Oni povis aĉeti "Promenbiletojn" por iri sur la fervojo inter Stannum kaj Gråbo – 3 km. Kiam oni aŭdis la trajnon oni saltis flanken.

Hodiaŭ la reloj estas for kaj oni povas promeni, bicikli kaj rajdi sur la vojeto, kiu parte estas asfaltita. Triono de la vojeto ne havas asfalton. Estas por la ĉevaloj, sed ne sur la tuta distanco.

### La poŝtejo de Stannum komenciĝis en 1900 en la fervoja stacidomo

En 1912 Stannum havis propran telefon-centralon.

La unuaj abonantoj estis:

- Nr 1 Aron Pettersson, Jönsagården
- Nr 2 Joh. Aug. Johansson, Östra Högen
- Nr 3 T R Sjöblom, affären = La ICA-vendejo
- Nr 4 August Pettersson, Stannumgården
- Nr 11 Stannum, la fervoja stacidomo



*Sur la bildo la du lastaj telefonistoj en Stannum.*

## La busvojaĝo inter Stannum kaj Svingeln en novembro 2017

Ni, kelkaj esperantistoj, kunvenis en Stannum, kie estas nia nova esperanto-biblioteko ekde iom da tempo. Nia tasko estis trafolumi materialon kaj ordigi librojn, kontroli dokumentojn kaj oldajn fotojn.

Tuj ekster nia libreja kelo preteriras aŭtobuso **BLUO**, kiu prenos nin ree al Gotenburgo.

Mi decidis forlasi la kunvenon iom pli frue kaj Andreas vidis per sia poŝtelefono ke mi havas 6 minutojn por atingi la haltejon. 6 minutoj por palpserĉi en la novembra mallumo al la haltejo.

6 minutoj – jes, ja tempo sufiĉis, sed mi fariĝis nevideblulino. Spite al tio ke mi portis du flavajn etajn rebrilplastaĵojn kaj ke mi sovaĝe svingis la blankan paĝon de bushoraro. La aŭtobuso preskaŭ tute preterpasis la haltejon kaj haltis tuj iom for. Kiam mi demandis la ŝoforon: "Ĉu miaj rebriloj ne videblas?" li levis sian tekono kaj donis al mi brakrebrilon kun teksto *Västtrafik* por meti al la maldekstra brako. "Maldekstra brako, montru vian maldekstran brakon," li diris kaj klakvolvis ĝin ĉirkaŭ mia brako kaj fine li povis ekkonduki sian aŭtobuson.

Poste li freneze preteriris aliajn haltejojn, kie ne estis atendantoj, kaj subite ekhaltis je haltejo Knipared. Tie ĉe la haltejo staris du volvo-aŭtoj ruĝaj kaj lumumis, eble ia teknika problemo. La busŝoforo estis je telefona kontakto kun iu trafikregadulo, kaj li diris: "Tie estas la ruĝa volvo-aŭto kiu frue postsekvis mian buson, mi vere rekonas ĝin." Li tuj forlasis sian stirlokono, lasis ĉiujn pordojn malfermitaj kaj hastis el la buso al la aŭtistoj, post longa momento revenis grumblante. Li ekstartis kaj denove rapide foriris.



Kiam ni alvenis la haltejon Linnarhultsvägen, li ellasis kelkajn pasaĝerojn tra la mezaj pordoj de la aŭtobuso kaj poste ekaŭdis strangaj pepsonoj de la ŝoforejo. La mezpordoj ne sin fermis, kiel ajn li provis. Denove li eliris la buson, restis ekstere kaj klopodis fermi la pordojn. Mi do pensis ke se li sukcesos, li ne povos eniri, ĉar la frontpordo jam estas fermita kaj la buso restas en idlado. Sed li feliĉe denove eniris kaj de la ŝoforejo li premis ĉiujn butonojn.

La frontpordo tiam ekmalfermiĝis kaj la mezpordojn fermiĝis, sed kiam li volis fermi la frontpordon, denove malfermiĝis mezpordoj. Kaj tiel li manipulis iom da tempo, ĝis finfine ĉiuj pordoj sin fermis, kaj li povis daŭrigi la kondukadon.

Kiam mi finfine estis je la haltejo Svingeln por eliri, la ŝoforo ridetis kaj diris: "Venontfoje vi kunportu poŝlampon!"

Foje dum la veturo mi vidis junan fraŭlinon svingi sian poŝtelefonon por atentigi pri haltado je haltejo. Tiam la ŝoforo dankis ŝin, sed ŝi ne ricevis brakrebrilon de Västtrafik.

*Inga Johansson*

PS: Titta gärna på YouTube: "Blå Express Kullavik till Gråbo" i tre delar. I den tredje delen stannar bussen i Stannum!



## Esperanto-sabato la 2an de decembro en Redbergsskolan

Christin ludis la trumpeton kaj ni kantis pliajn strofojn ol vi vidas ĉi-sube.

### El piprokuka land' (Tre pepparkaksgubbar)



Ni venas, ni venas  
el Piprokuka land'  
survoje, survoje  
ni migras man-en-man'.  
Kaj brunaj, kaj brunaj  
ni estas ĉiuj tri,  
korintajn okulojn,  
ĉapeloj klinas ĉi.

### Meznokt' regas (Midnatt råder)

Meznokt' regas, en domo nun silento –  
nun silento.  
Morgaŭ estos festo de advento –  
de advento.  
Tip tap, tip tap,  
Ti-pe ti-pe tip tap,  
Tip tip tap.



### Sankta Luĉia

En Svedio kantata frumatene la 13:an de decembro, la tago de Lucia. Sveda teksto de Arvid Rosén, esperantigita de Birger Gerdman. Sed la melodio origine estas barkista kanto el Napolo.

Peze la nokto nun  
domojn alpaŝas,  
teron forlasis sun'  
ombroj ĝin kaŝas.  
Tiam en nokta hor'  
pelos mallumon for  
Sankta Luĉia, sankta Luĉia.



### Paca nokt', Sankta nokt'

Originalo: Stille Nacht, heilige Nacht. Verkis Joseph Mohr 1818.

Paca nokt', Sankta nokt' !  
Songŝas stel'. En malhel'  
viglas ame la sankta par'.  
Ĉarma knabo kun bukla harar',  
Dormu, gardos Ĉiel',  
Dormu, gardos Ĉiel'.



Post la kantado ni ariĝis en tri grupojn kaj ricevis kartojn kun diversaj temoj:

**La unua grupo. Temo: "Oni devas esti singarda por ke neniu ŝtelu la kodon ĉe la elprenaparato."**

C. Saluton, Daniel! Bone ke vi venas! Ĉu vi volas stari apud mi, kiam mi elprenos mian monon?

D. Certe, mi volas. Bone vidi vin ĉi tie. Mi povus piede ataki la fiulon.



C. Jes, bone!

*Tria persono venas kaj petas helpon.*

D. Kion vi volas?

T. Mi volas ŝanĝi monerojn, ĉar mi bezonas moneron por butika puŝĉareto.

D. Ni ne havas ŝanĝmonerojn.

T. Mi bedaŭras.

*C (haste rigardas la ulon kaj memoras ke li estas pratempa samklasano):* Ho, vi aspektis danĝera kaj mi kredis, ke vi volis kaŝrigardi mian kodon.

T. Ĉu mi danĝera?

C. Ne, mi pardonpetas pro mia suspekto pri vi.

**La dua grupo. La temo: "Vi estas invitita al festo, sed ne emas iri tien."**

*Dommastrino, telefone:* Jes mi estas D.

*Malvolonta gasto:* Saluton, mi estas M.

D. Ho, mi ĝojas ke vi telefonas. Mi esperas ke vi fartas bone kaj venos al nia festo!

M. Mi bedaŭras, sed mi telefonas por diri ke bedaŭrinde mi ne

povos partopreni la feston, ĉar mi estos okupita tiam. Mi devas prizorgi la hundon kaj la kuniklojn.

D. Tiel bone! Ni havos la feston en bieno. Ni volonte havos la hundon kaj kuniklojn en nia



festo. Vi devas veni, ĉar vi devas esti prizorganto ĉe la rostilo.

M. Bedaŭrinde la hundo havas pulojn.

D. Ni povas bani la hundon antaŭ la festo.

M. Ne eblas forigi pulojn tiel rapide.

D. La hundaj puloj ne estas danĝeraj por homoj. Ni volas prepari surprizon por la hundo. Eble la hundo povas resti hejme dum tri horoj dum la festo.

M. Ni ne povos veni, ĉar ni devas esti hejme kaj studi esperanton.

D. Ĉiuj en la festo scias esperanton.

M. Sed ni ne scias sufiĉe da esperanto por povi partopreni en festo.



**La tria grupo: La temo: "Vi serĉis laboron kaj nun vi estas ĉe la ĉefo de la entrepreno por intervjuo. Dum la intervjuo vi subite ne plu volas la dungon."**

A. Bonvenon! Bv. sidiĝi.

B. Dankon!

A. Mi legis vian CDn kaj ni interesiĝas pri vi.

B. Jes, mi pensas ke estas interesa laboro.

Kial tia interesa laboro estas libera?

A. Sinjoro Karlsson havis la laboron dum kvin jaroj, sed nun li edziĝis kaj la paro baldaŭ translokiĝos al Kameruno. Kiam vi povos komenci la laboron ĉe ni?

B. Mi estas dungita ĝis la unua de januaro en mia nuna laboro.

A. Ĉu mi povas demandi al vi en kiu zodiaka signo vi naskiĝis.

B. (plilaŭtigas la voĉon): Ho ve! Mi tute ne ŝatas vian demandon. Ĉi tio ne estas ĉina entrepreno, ĉu??? Ĝis revido!

A. Ho, sed... sed... kial ŝi forkuris???

## Esperanto en Ĉinio!

(el la fejsbuka paĝo de Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI)

**Vidu! La esperanta flago estas la unua inter multaj – se oni legas de maldekstre al dekstre.**

Ŝajnas ke Pekingo estas en la kapo de turistaj lokoj por doni al ĉiu informon en la gepatra lingvo. Ĉi tie informtabulo ĉe la Malpermesita urbo.

La Malpermesita urbo estis la imperiestra palaco, uzata dum la Ming- kaj Qing-dinastioj. La palaco troviĝas norde de la Ĉiel-Paca placo en la centro de Pekingo.

24 imperiestroj regis Ĉinion de la Malpermesita urbo ekde la inaŭguro 1421 ĝis 1911. Onidire la palaco havas 9 999 ½ ĉambrojn, sed estas "nur" 9 371. Hodiaŭ la

palaco estas unu el la plej vizitataj turistaj celoj de la mondo.

**Interrete vi povas aŭskulti CRI, la Ĉinia Radio Internacia:**

<http://esperanto.cri.cn/radio/china.htm>



## Marjorie Boulton (1924 – 2017) kun unu el siaj katoj

Ŝia verkaro ampleksas poeziaĵojn, dramojn, novelojn, rakontojn kaj eseojn. Ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA.

Boulton skribis du biografiojn pri Zamenhof, unu en la angla, la alia en Esperanto. En 1984 ŝi verkis "Faktoj kaj Fantazioj". Oni povas aŭskulti partojn de "Faktoj kaj Fantazioj" en <https://soundcloud.com/luis-jorge-santos-morales/faktoj-kaj-fantazioj-de-marjorie-boulton>



Jen Verso pri korelativoj:

Iu ŝtelis mian ĉerizartan!  
Mi nur iris al la kafmaŝin'  
iu iel faris la forportan  
iu ien iel portis ĝin!

les mano estas malhonesta  
lom mankas konscienco, ie!  
Iu prenis ĝin, fiulo pesta,

ial – ĉu malsate, ĉu envie?

Se mi iam trovos tiun ulon  
kiu mian torton ie manĝos,  
rompos mi tibion kaj fibulon  
kaj la formon de la nazo ŝanĝos!

Kia ulo ion ŝtelas, kia  
besto? – ia varo por katenoj...  
ia bubo... ia... ia... ia...  
Tamen, ia-adu nur azenoj !

Marjorie Boulton ŝatis katojn... Kat-amantoj troviĝas ĉie en la mondo. Susanna Schötz, fonetikisto kaj lingvoesploristo je la universitato de Lund, esploras pri la miaŭo de diversaj katoj. Ŝi enbendigas la sonojn de katoj en diversaj situacioj. Estas diferenco inter la miaŭ-sono de kato kiu ĵus havis matenmanĝon kaj kato kiu sidas en transportkaĝo. Sed ĉu katoj ankaŭ havas diversajn sonojn depende de la geografia loko? Ĉu kato de Lund havas alian dialekton ol kato de Sundsvall? Estas varioj en la melodio. Ĉu katoj povus miaŭi esperante? ☺

## Lingvoj en Eŭropo – multaj!



Por solvi la lingvan problemon oni provis krei "mondan lingvon".

Jen kelkaj el la planitaj lingvoj en tempoordo:

Volapük, Esperanto, Ideom neutral, Latino sine flexione, Ido, Occidental, Novial, Interglossa, Interlingva, Loglan, Europanto (ur Språk och skrift i Europa av R. Hansson, C.G. Lindgren, H. Ljung kaj T. Lundén).

Jen iomete pri Ido – la ido de Esperanto:

En 1900 oni starigis komitaton por provi ekzistantajn proponojn pri mondlingvo. La franca esperantisto Louis Beaufront faris "reformitan proponon pri esperanto" kiel

bazon por nova helplingvo. Subkomitato sub gvidado de Louis Couturat laboris, kaj en 1908 oni kritikis esperanton pro la ĉapelitaj literoj, kiuj ne troviĝas en la latina alfabeto. La akuzativan -N oni forprenis – malfacile lerni, ili (kaj vi?) diris.

El la multaj plalingvoj, esperanto estas la plej disvastigita. En esperanto troviĝas ideologio, kiu i.a. diras, ke komuna lingvo gvidos al pli paca mondo. Esperantistoj havas eblecon mem krei vortojn. Poste la ofteco de la nova vorto decidas ĉu la vorto fariĝos esperantovorto aŭ ne.



## La tri kantobirdoj de Svedio

### Christina Nilsson

– fama sveda, internacia kantistino, kiu dum la dua duono de la 19a jarcento lasis sian belan sopranon disvastiĝi helan sonoron en Svedion kaj en la mondon. Ŝi naskiĝis la 20an de aŭgusto, 1843, kiel la sepa infano de Jonas Nilsson kaj Stina-Caisa Månsdotter, kiuj loĝis en farmo ekster Växjö. Kio ajn estu pri la profitodoneco de la farmo, la hejmo estis plenplena je ĝojo, kaj muziko kaj Christina lernis ludi la violonon de frato. Estis la patrino, kiu malkovris la grandan talenton de Christina kaj venigis ŝin al foiroj, kie ŝi kantis kaj ludis.



La foirvizitantoj donis nekredeblan respondon kaj en la foiro de Ljungby en 1857, la distrikta ĵuĝisto Tornérhielm konatigis ŝin. Li decidis pagi ŝian edukadon. Christina translokiĝis al Gotenburgo, kie ŝi estis edukata de la kantistino Adelaide Valerius Leuhausen kaj la 19an de majo, la saman jaron, ŝi debutis. Poste ŝi translokiĝis al

Stokholmo kaj Parizo. Ŝi akiris sukceson kaj la fameco iris antaŭ ŝi en la mondon.

Ŝi mortis la 22an de novembro 1921 en la urba hotelo de Växjö de ambaŭflanka pulminflamo, akirita en Hispanio.



### Jenny Lind


– la sveda najtingalo.

Jenny Lind naskiĝis la 6an de oktobro 1820. Ĉar la gepatroj ne estis geedzoj, ŝi estis rigardata neleĝa infano. Ŝia patrino ne estis afabla, kaj faris la infanecon de sia filino malfacila per eternaj kvereloj kaj perfortoj.

Tage ŝi kutimis sidi ĉe la fenestro kantante kaj iun tagon persono de la Reĝa Opero preterpasante aŭdis ŝian kantadon.

La reputacio kreskis kaj ŝi fariĝis fama. Dum ŝia kantanta vivo ŝi turneis multloke en la mondo kaj ĉie oni ravitiĝis pri la bela kanto. La duan de novembro 1877 Jenny Lind mortis. Ŝi estis enterigita en Anglio en la tombejo de Worcester. Sed eĉ se la bela kanto silentiĝis por ĉiam, oni povas legi la fabelon pri la "Najtingalo" de H.C. Andersen .

Ĉar tiun fabelon li skribis al la kantistino, al kiu li enamiĝis.



### **Birgit Nilsson**

"La Nilsson"

Märta Birgit Nilsson naskiĝis la 17an de majo 1918. Certe la anĝeloj de la ĉielo kantis aparte bele tiun tagon. Birgit publike kantis por la unua fojo je sia bapto en la preĝejo de Västra Karup. La pastro onidire rekomendis "la vataĵon kun forto (=alkoholaĵo)" por haltigi la "kanton".

Ŝi havis feliĉan infanecon en la farmo Svenstad nr 9 sur la duoninsulo Bjäre.

Kiam ŝi komencis la lernejan studadon ŝi jam konis multon kaj la ateston "A" pri paroltalento ŝi frue ricevis. Baldaŭ Birgit havis estontan kantkarieron.

Kelkaj gravaj jardatoj:

1946 ŝi debutis ĉe la Reĝa Teatro en Stokholmo, sed la granda akiro de renomo venis la jaron poste en la rolo de "Lady Macbeth" en la Opero de Verdi.

1954 ŝi fariĝis kantisto de la kortego.

1960 membro de la Reĝa Muzika Akademio.

1968 membro de la analoga akademio de Aŭstrio.

1968 la sama de Bavario.

1998 ricevis la nomon universitata profesoro.

Krom ĉiuj muzikaj sukcesoj Birgit Nilsson estis varma kaj bonhumora persono, kiu partoprenis diversaĵojn. "Jen via vivo", televida programo kun Lasse Holmqvist, estas ekzemplo. "Kanto en la hejmgregiono" estas alia. Ŝi ruzlerte replikiĝis kun ĉiama sprito.

La kanto silentis la Kristnaskan tagon 2005 kaj nun Birgit Nilsson kuŝas en la tombejo de Västra Karup. Sed ĉiam – kiam ni havas multe da mono – ŝi memorigas nin pri ŝi sur la 500-monbiletoj. Mi varme rekomendas ŝiajn skribitajn rememorojn "La Nilsson" kiu eldoniĝis en 1995. Serĉu en malnovlibrejoj! Mi intencas relegi mian ekzenpleron kiel amuzan kristnaskan donacon. /Ingegerd





## Kristnasko en Novjorko



Oni aŭdas rakontojn, kiuj restas en la memoro, sed la memoro ne ĉiam estas fidinda. Detaloj estos ŝanĝitaj, sed la kerno kaj etoso restas.

### Mia versio de la rakonto

Jill hejmeniris post sia laboro kelkajn horojn antaŭ Jim. Estis ilia unua kristnasko kiel geedzoj. La salajroj estis malaltaj kaj ili nur havis monon por la plej nemalhaveblaj aĵoj. Pri kristnaskaj donacoj ili ne pensis. Jill pretigis la tablon. La meleagro estis en la forno. Multekosta, sed necesa – tamen estis ja ilia unua kristnasko kune. Ankoraŭ restis unu horo ĝis la alveno de Jim. Jill decidis promeni iomete, sed unue ŝi elprenis la meleagron el la forno.



En la montrofenestro de horloĝvendejo ŝi vidis horloĝan ĉenon. Hmmm, belega! La horloĝa ĉeno de Jim estas tro malnova kaj malmoderna, ŝi pensis. Sed la

prezo estis tro alta kaj ŝi pluiris. En la montrofenestro de frizisto ŝi vidis ŝildon: "Ni aĉetas hararon". La hararo de Jill estis longa, bela kaj malhela. Jim tre ŝatis ĝin. Por la mono de sia hararo ŝi povus aĉeti la horloĝĉenon kiel donacon al Jim. Pensite, farite! En la spegulo de la frizisto ŝi vidis sian vizaĝon kun la mallonga nova hararanĝo. Bone – malbone, ŝi ne sciis.

Tuj al la horloĝa vendejo. La mono sufiĉis kaj ŝi hejmeniris kun la ĉeno en skatolo. Hejme ŝi cerbumis... Kion Jim dirus kiam li vidos ŝin

kun la nova tondfasono? Ŝi surmetis koltukon por ke Jim tuj ne estu trafita de ŝoko.

Intertempe Jim vere cerbumis kiel trovi donacon al Jill. Ofte la paro preterpasis la friziston kaj li sciis ke Jill volus perlan harbroĉon por kunteni ŝian longan hararon. Hejmenirante li vidis tri grandajn horloĝojn – sur la preĝejo, sur la urbodomo kaj ĉe la horloĝvendejo. Hejme li havis vekhorloĝon. – Fakte mi ne bezonas mian poŝhorloĝon, li pensis kaj eniris la horloĝvendejon. – Kiom da mono ĉi tiu horloĝo valoras, li demandis. La respondo ĝojigis lin. Sufiĉe por aĉeti la perlan harbroĉon. Dirite, farite. Post kelkaj minutoj li hejmeniris kun la broĉo en eta paketo.

La etoso estis gaja kaj atenda, kiam ili surtabliĝis kaj manĝis. Ili parolis pri la fakto ke ili nun loĝas en propra apartamento, ambaŭ havas laborojn tamen ne bone pagitajn, sed plej grave – ili havis unu la alian.

Post la manĝo Jim donis sian donacon al Jill kaj atendis ŝian gajan ekkrion. Ŝi demetis la paperon, malfermis la skatolon kaj brilis la perla harbroĉo. Ŝi miris ... kaj demetis la koltukon... Silenta momento. Tuj Jill pensis ke nun estas ŝia vico doni sian donacon al Jim. Ŝi tiretis la malnovan horloĝĉenon de Jim por demeti el la poŝo de Jim la horloĝon. Jes – vi scias ke horloĝo ne troviĝas.

Unue nova silento, poste ili ridegis... Kia situacio! Harbroĉo sen longa hararo en kiun meti ĝin kaj horloĝĉeno sen horloĝo. Sed aĵoj ne multe gravas, ili pensis. Ni ja amas unu la alian kaj la estonteco ŝajnas hela.

Ĉu vi pensas ke Jill uzis sian harbroĉon kiam la hararo estis sufiĉe longa? Kaj ĉu vi pensas ke Jim de tempo al tempo gajnis sufiĉe por aĉeti novan horloĝon? Pri tio mi estas certa. Sed ĉiun jaron poste ili sendube memoras sian unuan kristnaskon kun rideto. /Siv





## La Kristnaska Evangelio

Kaj en tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto, ke la tuta mondo estu registrita. Ĉi tiu estis la unua registrado, farita, kiam Kirenio estis reganto de Sirio. Kaj ĉiuj iris, por esti registritaj, ĉiu al sia urbo. Kaj Jozef ankaŭ supreniris el Galileo, el la urbo Nazaret en Judujon, al la urbo de David, kiu estis nomata Bet-Leĥem, ĉar li estis el la domo kaj familio de David, por esti registrita kun sia fianĉino Maria, kiu estis graveda.

Kaj dum ili estis tie, venis la tagoj por ŝia akuŝo. Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar ne estis loko por ili en la gastejo.

Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis sian gregon.

